# SOMERA ESPERANTO-KURSOJ LANČOV, ĈEĤA RESPUBLIKO

**La 1-a etapo – ne okazos**
**13.7.- 26.7.2014 - La 2-a etapo**
**27.7.- 08.8.2014 - La 3-a etapo**

Estimata samidean(in)o,

La Esperanto-klubo en Třebič aranĝas Somerajn kursojn de Esperanto, angla, germana kaj dum la dua etapo ankau hispana lingvoj. La kursoj okazas en tri etapoj, en la tradicia loko ĉe digolago de Vranov, apud vilaĝo Lančov, distrikto Znojmo, en suda Moravio. La instruado de Esperanto, angla, germana kaj hispana lingvoj okazas ĉiutage kvar instruhoroj.

Ĉiu partoprenanto povas frekventi iun el la kursoj au simple libertempi. La loĝado estas en duonlitaj kaj kvarlitaj kabanetoj. La manĝojn estas kvinfoje tage. Postagmeze okazas libervola programo ekzemple sinbanado, sportado, ekskursoj, vespere tendarfajroj kaj aliaj programeroj. La ekskursoj ne estas enkalkulitaj en la kotizo de restado. Eniro al kasteloj estas proksimume 3-4 EUROj. Partoprenantoj povas viziti kastelojn Vranov, Bitov, Cornštejn, urbon Znojmo kaj partoprenantoj kun propra trafiko povas veturi kaj viziti UNESCO urbojn Telč, Třebič kaj aliajn interesajn lokojn.

**Grava atentigo:** Bedaŭrinde ni ne povas sendi invit-leterojn al tiuj, kiuj ĝin bezonas por eniri en Ĉeĥion pro viza devo.

Nia loko troviĝas apud vilaĝo Lančov, proksime urbeto Vranov ĉe Dyje. La plej proksima fervoja stacio estas Šumna. El Šumna eblas daurigi per buso al Vranov. Same oni atingas Vranov ankau el urbo Znojmo. Eblas anonci sian alveturon aŭ retpoŝte podhradska@volny.cz ,aŭ telefone +420 736 249 264 por pliprecigi la informojn. La kotizo de 195 EURO inkluzivas kvin manĝojn tage, loĝadon kaj kursojn.

Pli vidu : www.set-lancov.cz

Aliĝilon sendu rete je supra retadreso.

ESPERANTO-KLUBO TŘEBIČ
PO Box
674 01 TŘEBIČ

Aliĝilo:
Nomo: .............................................. dato de naskiĝo: ........................etapo: ..............
Adreso: ........................................................................................................................

Alveturo: skribu, se vi bezonus nian helpon